




28a jarkolekto - januaro 2007/1

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



Sukcesa terorismo




Reto 2.0



**Krozi
en glacio**

La jaro 2007

Via poŝamiko dum la tuta jaro 2007 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).

Sukcesa terorismo

7

Kiam la usona prezidanto kaj liaj samideanoj fine komprenos, ke la „milito” kontraŭ terorismo fiaskis, devas fiaski, precipe se oni perfidas pro ĝi la proprajn valorojn? Ne, venki sur tiu kampo oni povas nur per politiko, per ideoj kaj valoroj. Per ili oni devas kontraŭbatali ĝin, se la okcidento ne volas pereji per memdetrua reago.



Internaciaj respondkuponoj:

13

Ĉu fino alproksimiĝas?


El ekonomia vidpunkto la sistemo de internaciaj respondkuponoj (IRK) estas unikaĵo: per ĝi eblas protekti sian investon kontraŭ inflacio kaj kontraŭ valutŝanĝoj. Tamen, pro novtipaj komunikiloj la IRK riskas malaperi.



Reto 2.0

16

Reto 2.0 (angle Web 2.0) estas neformala nomo por la plej lastaj evoluoj en la TTT (Tut-Tera Teksaĵo). Tiu nomo ekuziĝis en konferenco en oktobro 2004. Oni rimarkis, ke en la Reto aperas interesaj novspecaj aplikaĵoj, kiuj estas tre utilaj por ordinaraj uzantoj.



La ĉefaj murdistoj de HIV-infektitoj

19

Jam preskaŭ kvaronjarcenton aidoso daŭre etendiĝas sur la planedo, alportante sennombrajn suferojn kaj viktimojn. Nuntempe la nombro de infektitoj per HIV, la imun-detrua viruso, en la mondo oficiale superas 40 milionojn.



| | |
|--|----|
| POLITIKO | |
| Kosovo | 8 |
| Lasta manovro | |
| MODERNA VIVO | |
| Litovio | 9 |
| Kleruloj, revenu | |
| Tirana kresko | 9 |
| Turismo..... | 10 |
| Giganta projekto | |
| Decido aŭtokrata | 10 |
| Ukrainio | 11 |
| Lviv / kaj mort' | |
| Instruado | 11 |
| Senkosta servo multe kostas | |
| Lardo-ardo..... | 11 |
| EKONOMIO | |
| Madagaskaro | 12 |
| Aŭtokomercu pli strikte regulita | |
| Poŝto..... | 13 |
| Internaciaj respondkuponoj, ĉu fino alproksimiĝas? | |
| Energio | 12 |
| Nuklea energio restu en Litovio | |
| TURISMO | |
| Finnlando | 13 |
| Krozi en glacio | |
| KOMPUTADO | |
| Interreto | 16 |
| Reto 2.0 | |
| Interreto | 18 |
| Kiom grandas la virtuala mondo? | |
| SCIENCO | |
| Aidoso-rilataj malsanoj | 19 |
| La ĉefaj murdistoj de HIV-infektitoj | |
| LIBROJ | |
| Majstra verko de aŭtoro preskaŭ nekonita | 21 |
| Malutopio..... | 22 |
| SPIRITA VIVO | |
| Litovio | 23 |
| Astrologoj progresas | |
| Reago..... | 24 |
| Kion signifas la nocio laŭnature? | |
| NOVELO | |
| Sep citronsemoj | 25 |
| <hr/> | |
| Abonoj | 4 |
| Enkonduko | 5 |
| Leteroj..... | 6 |
| El mia vidpunkto..... | 7 |
| Anoncetoj..... | 27 |

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al reĉbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto | MONATO | | La Jaro aere | | |
|---------------------|---------|------|----------------|-----|------|
| | surface | aere | 1 fojon monate | tuj | |
| Argentino | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Aŭstralio | AUD | 82 | 90 | 9 | 17 |
| Aŭstrio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Belgio | EUR | 46 | 56 | 5 | 9 |
| Brazilo | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Britio | GBP | 32 | 35 | 4 | 6.5 |
| Bulgario | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Ĉeĥio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Danio | DKK | 345 | 375 | 40 | 70 |
| Estonio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Finnlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Francio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio orienta | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Grekio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Hispanio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Honkongo | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Hungario | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Irlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Islando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Israelo | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Italio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Japanio | JPY | 6900 | 7300 | 860 | 1260 |
| Kanado | CAD | 73 | 78 | 9 | 15 |
| Kipro | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Koreio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Kroatio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Latvio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Litovio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Luksemburgo | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Malto | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Nederlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Norvegio | NOK | 390 | 430 | 45 | 71 |
| Nov-Zelando | NZD | 93 | 99 | 9 | 18 |
| Pollando | PLZ | 99 | 110 | 22 | 36 |
| Portugaliao | EUR | 37 | 41 | 5 | 9 |
| Rusio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Singapuro | EUR | 41 | 45 | 5 | 10 |
| Slovakio | EUR | 23 | 26 | 5 | 9 |
| Slovenio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Sud-Afriko | EUR | 41 | 46 | 5 | 10 |
| Svedio | SEK | 430 | 465 | 49 | 84 |
| Svislando | CHF | 74 | 81 | 9 | 14 |
| Tajvano | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Usono | USD | 61 | 65 | 8 | 13 |
| Baza tarifo | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ermits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Hilde Maul, Pferserer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosa 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japano:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatf@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Rete: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org



Malfeliĉiga televido

Jam plurfoje en tiu ĉi revuo mi plendis pri unu el la plej gravaj amaskomunikiloj, televido. Mi asertis, ke ĝi fariĝis pli kaj pli banala kaj triviala, ke ĝi degeneris. Tiel mi juĝis ja fake, kiel ĵurnalisto, tamen laŭ personaj impresoj kaj sperto. Nun mian kritikon subtenas scienca esploro kun rezulto surpriza eĉ por mi: televido malfeliĉigas! Israela studaĵo, farita en 45 landoj kun okcidenta civilizacio, montras, ke homoj estas ekstreme malkontentaj pri la tv-programoj. Kaj oni trovis klaran momenton, ekde kiam televid-spektantoj sentas tion: post enkonduko de privataj, komercaj televid-kanaloj. 28 elcentoj de la pridemanditoj diris, ke ili estis pli kontentaj antaŭe, kiam en multaj landoj ekzistis nur kelkaj ŝtataj aŭ duonŝtataj televidoj kun seriozaj, informriĉaj kaj digne distraj programoj. Nun, kun abundo da privataj kanaloj, ili suferas pro manko de dormo, pro inkuboj post horrorfilmoj, pro malkresko de sociaj kontaktoj, pro manko de interparolado, pro enuo(!). Iuj plendas eĉ pri reduktiĝo de fizika forto, pri problemoj de sangocirkulado kaj tro alta sangopremo. 41 elcentoj diras, ke ili spertas per televido malavantaĝojn por la persona evoluo.

Sed, ĉu la komercaj televid-kanaloj ne asertas, ke ili kontentigas ĉiujn per sia abunda programaro kun buntaj revuoj, distrado, amuzo kaj klerigo? Jes, la programoj estas buntaj, sed sur kiu nivelo! Ili grandparte kontentigas la plej primitivajn instinktojn. Bonŝancaj estas tiuj homoj, kiuj anstataŭ televidi vizitas trinkejojn por renkonti amikojn, kiuj invitas gastojn por kune festi, kiuj sportas ekstere aŭ simple nur promenas, renkontante aliajn homojn.

Kion signifas la rezultoj de la menciita studaĵo por ni ĵurnalistoj de presitaj komunikiloj? Ĉu eble por ni estas pli facile feliĉigi niajn konsumantojn? Niaj aŭtoroj kaj redaktoroj ĉiuokaze klopodas kontentigi vin. Do ni esperas, ke ankaŭ dum tiu ĉi nova, la 28a jaro de nia revuo, vi estos feliĉa dum legado ...

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵoj ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainicite. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Unu viro valoras du virinojn (2)

Oni povas mispruvi ĉion ajn per selektema citado el la Korano. Bedaŭrinde tio veras ne nur por ne-islamanoj, sed ankaŭ por islamanoj mem. La Korano estas tutaĵo, kaj necesas, ke oni legu ĝin tiele. Mi atentigas pri du punktoj en la letero de Jomo Ipfelkofer (*Unu viro valoras du virinojn*, MONATO 2006/10, p. 6).



Nur en unu kunteksto en la Korano troviĝas tiu egaleco inter unu viro kaj du virinoj kiel atestantoj. Tie temas pri negoca kontrakto. Oni argumentas, ke en la Arabio de la 7a jarcento (kaj, bedaŭrinde, en multaj landoj eĉ nun) virinoj ne kutimis partopreni negocajn aferojn.

Pri heredaĵo: viro ricevu la samon kiel du virinoj. Oni memoru, ke en islamo la familio estas la normo; laŭ la islama leĝo la edzo devas subteni la edzinon kaj la infanojn. La edzino rajtas elspezi sian monon, kiamaniere plaĉas al ŝi.

Angus WILKINSON
Britio

Danko al Koffi

Pro la artikolo *Mia religio* de Gbeglo Koffi (MONATO 2006/12, p. 26) mi finfine scias, al kiu religio mi apartenas! Kun danko,

Jean Pierre VANDENDAELE
Belgio

Elektita al la kenja parlamento

En MONATO 2006/12, p. 21, Edward Kusters skribis, ke „Wangari Maathai [...] ne estis vere elektita demokrate fare de la kenja parlamento kun 98 % de la voĉoj”. Kvankam eblas diskuti, ĉu elekto kun 98 % de la voĉoj estas vere demokrata, ŝi certe estis elektita ne „fare de”, sed „al” la kenja parlamento.

André RUYSSCHAERT
Luksemburgo

„Kontroli” ne egalas al „regi”!

Plurfoje Josef Mendl en sia artikolo *Ĉu militoj savos Usonon?* (MONATO, 2006/10, p. 24-26) uzis la vorton „kontroli” (verŝajne kiel falsan amikon), kiam li celis „regi”, „gvidi” aŭ „direkti”: „Ili rajtas posedi kaj plene kontroli ...”, „Temis pri kontrolo de nafto ...”.

Laŭ pluraj vortaroj (inkluzive de PIV kaj PIV2) tio estas eraro. Aŭ ĉu MONATO malkonsentas, ke tia uzo de „kontroli” estas erara?

Russ WILLIAMS
Pollando

Efektive temas pri ofta eraro, kaj la revizianto eĉ plurfoje anstataŭigis „kontrolo” per „regado” en la koncerna artikolo. Tamen kelkajn okazojn li pretervidis, pro kio ni pardonpetas.

DONACKUPONO

- Donaco por via korespondamiko?
- Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?
- Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

NOVAĴO

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Sukcesa terorismo

de Stefan MAUL

La batalo kontraŭ terorismo daŭras nun jam multajn jarojn, sed la rezultoj kaj sukcesoj estas nur bagatelaj. Ŝajnas, ke ĝis nun oni ne trovis taŭgan strategion por elimini terorismon – male: la uzataj rimedoj evidente kreas nur pliiĝon de terorismo. La usona prezidanto George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] proklamis tiun batalon „milito kontraŭ terorismo”, kio klare indikas, ke li kaj liaj kunregistoj kaj aliancanoj opinias, ke oni povas ekstermi ĝin per militistaj rimedoj kaj metodoj. La kompleta fiasko de okcidentaj trupoj en Irako (kaj parte en Afganio) pravas, ke tio estas funda eraro. Ankaŭ en Proksima Oriento israelaj militistoj ne sukcesas sufoki terorismon de palestinanoj.

Alia celo

Ankaŭ polico, cetere, ne kapablas per siaj metodoj sukcese batali kontraŭ la nunaj teroristoj. En pasinta jarcento teroristoj celis precipe al institucioj kaj ties reprezentantoj, murdante ekzemple politikistojn. Jes, tio okazas ankoraŭ, sed la precipa strategio de nuna islamista terorismo estas alia: la fanatikuloj per bomboj eksplodigas trajnojn, kiel okazis en Londono kaj Madrido, per suicid-atencoj murdas amase ordinarajn homojn, kiel okazis antaŭ kvin jaroj en Novjorko per avioj detruintaj komercajn turojn. La teroristoj murdas homojn en israelaj kafejoj kaj sur irakaj bazaroj. Ju pli multaj homoj mortas, des pli triumfas la krimuloj, ĉar tio kaŭzas hororon kaj angoron inter la civitanoj – kaj ĝuste tion celas la aktuala terorismo.

La teroristoj volas malstabiligi okcidentajn demokratajn sociojn – kaj plene sukcesas. Oni reduktis en okcidentaj landoj rajtojn de civitanoj kaj donis preskaŭ ĉiujn rajtojn al polico kaj sekretaj



servoj. Oni instalas ĉie en grandaj urboj gvat-kamerojn, en stacidomoj kaj placoj, antaŭ kaj en publikaj konstruaĵoj. Oni subaŭskultas telefonadon de ĉiu ajn, por tiel elspioni eventualajn teroristojn. Oni enkondukis en flughavenoj striktajn kontrolojn kaj preskribojn, tiel ke nun ni ne rajtas kunporti en la pasaĝerejon eĉ limonadon, ĉar ĝi povus enhavi eksplodilon. Ĉio tio estas ne nur absurda, sed grandparte malhumana, detruas la demokratian liberecon de la okcidentaj socioj.

Malĝustaj reagoj

La triumfo de tiu terorismo estas ne la krimaj agoj mem, sed ĝuste tiuj historiaj kaj panikaj reagoj, per kiuj la okcidentaj sistemoj detruas sin kvazaŭ mem. Kaj malvenkis precipe Bush, ĉar li ne percep-

tiun strategion. Li komencis kriman militon kontraŭ Irako per mensogoj kaj ignorante internacian juron kaj nun devas ekkoni, ke eĉ plej bone ekipitaj usonaj soldatoj ne sukcesas sufoki terorismon en Irako, male kaŭzis sangan intercivitanan militon en tiu lando, kiun laŭdeklare oni volis liberigi el despotismo. Li volis defendi demokration en okcidento kaj instalati demokration en Irako, sed li detruis demokration hejme kaj alilande.

Kiam la usona prezidanto kaj liaj samideanoj fine komprenos, ke la „milito” kontraŭ terorismo fiaskis, devas fiaski, precipe se oni perfidas pro ĝi la proprajn valorojn? Ne, venki sur tiu kampo oni povas nur per politiko, per ideoj kaj valoroj. Per ili oni devas kontraŭbatali terorismon, se la okcidento ne volas pereji per memdetrua reago. ■

Lasta manovro

La nova konstitucio de sendependa Serbio, voĉdonita antaŭ nelonge, apenaŭ diferencas de la malnova. Tamen en la enkonduko ĉi-foje estas substrekite, ke Kosovo plurestas integra parto de Serbio. Tiamaniere la „demokrataj” gvidantoj en Serbio esperis pri popola apogo por la venontaj ĝeneralaj balotoj. Tamen nur malmulte da serboj voĉdone subtenis la novan konstitucion. Ili komprenis, ke la nova reĝimo ne multe diferencas de tiu de Milošević.

Por albanoj en Kosovo, konsistigantaj 93 % de la loĝantaro de la provinco iam aŭtonoma en eksa Jugoslavio, la referendumo estis ne nur granda provoko naciisma fare de serboj, sed ankaŭ lasta manovro de regantoj en Beogrado por savitio, kio saveblas, kaj por prokrasti la difinon de la statuso de Kosovo. Tiu ĉi difino, longe atendata, ebligis al Kosovo pluevoluigi sian ekonomion kaj prosperigi la vivon de siaj loĝantoj. Aktuale Kosovo rajtas nek akcepti fremdajn investojn, nek administri siajn financojn, nek aliĝi al internaciaj organizaĵoj. Difino de la statuso de Kosovo ankaŭ malpligrigas la elspezojn de la internacia komunumo kaj ĝia administracio kaj armeo.

Sange aŭ pace

Notindas, ke ĉiuj eksaj respublikoj de Jugoslavio jam sendependiĝis, ĉu sange (Slovenio, Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino), ĉu pace (Makedonio kaj Montenegro). Kosovo, tamen, kun loĝantaro plejmulte neslava kaj la tria plej granda en eksa Jugoslavio, ankoraŭ ne sendependiĝis. Prezidanto Tadić de Serbio, demandite, kial Montenegro rajtas sendependiĝi, dum Kosovo ne, deklaris simple, ke Kosovo diferencas de Montenegro. Simile la ĉefministro de Serbio Koštunica, konata kiel naciisto, klarigis plurfoje, ke Serbio ne povas cedi 15 % de sia teritorio (do Kosovon). Li forgesas, ke albanoj inter 1878 kaj 1945 devige cedis al serboj ĉirkaŭ 50 % de siaj etnaj teritorioj.

Kiel ajn, la difino de la statuso de Kosovo, kvankam denove prokrastota, fine solviĝos favore ne nur al albanoj, sed ankaŭ al aliaj malplimulto en la regiono. Sendependa Kosovo, eĉ sen propra armeo, propra ministrejo pri eksteraj aferoj, sidloko en Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, fariĝos tamen stabiliga kaj trankviliga faktoro en Balkanio. Tiel ĝi estos malfermita egale al Serbio kaj Albanio kaj pace kunvivos kun ĉiuj najbaraj balkanaj landoj.

Bardhyl SELIMI

LITOVIO

Kleruloj, revenu

Ne eblas precize diri, kiom da kleruloj forlasis Litovion dum la 16 jaroj de post la sendependiĝo. Tamen la ministrejo pri klerigo kaj scienco konstatis, ke junaj kleruloj elmigris pro mizeraj materiaj kondiĉoj kaj pro manko de scienca ekipaĵo necesa por fari esplorojn. Nun la registaro volas, ke la sciencistoj revenu.

Danke al iniciato de Eŭropa Unio, kleruloj, kiuj deziras daŭrigi siajn karierojn en la iama patrujo, estos invitatitaj dum kvaronjaro prelegi en Litovio, gvidi seminariojn aŭ partopreni enlandajn esplorojn.

Sciencisto, kiu antaŭ pluraj jaroj forlasis Litovion, diris, ke li volas reveni, por ke liaj infanoj lernu la litovan. Li aldonis: „Patrujo ja estas patrujo. Krome la situacio en Litovio dum la lastaj dek jaroj multe pliboniĝis.”

Tamen la revenintoj alfrontos problemojn. La salajroj en Litovio ne atingis tiujn en aliaj landoj, kaj ne ĉiu fakestro volas havi subulon pli spertan ol li. Kaj fojfoje kolektivoj, precipe sciencaj, malemas akcepti homon nekonatan, aparte pro tio, ke ŝtataj sciencaj institucioj administras sin mem.

Laimius STRAŽNICKAS



Universitato de Vilnius

Tirana kresko

Post la greka ĉefurbo Ateno la plej dense loĝata ĉefurbo en Eŭropo estas Tirano. Statistikoj indikas, ke Tirano havas 586 000 loĝantojn sur ĉirkaŭ 48 kvadrataj kilometroj. La urbo ekkreskis en 1990, kiam falis la centralizita ŝtato, kiu malpermesis domkonstruadon kaj liberan moviĝon de homoj. Ekde tiam la loĝantaro triobliĝis, kaj ekde 2001 la urbo kreskis je 24 %.



En 1930 italaj fakuloj prognozis, ke Tirano kreskos ĝis la jaro 2020 ĝis la urbeto Vora (14 km for). Ŝajnas, ke la

fakuloj ne eraris, ĉar Tirano kreskas laŭ tia ritmo.

Bardhyl SELIMI

TURISMO

Giganta projekto

La israela ministrejo pri turismo helpas krei la unuan israelan elefanto-parkon. Planite estas venigi kelkdekojn da elefantoj el Tajlando kaj aliaj aziaj landoj. La bestoj – ĉefe elefantinoj, ĉar ili estas pli amikemaj – vivos libere, sen kaĝoj, ĉe kibuco Nahal-Oz, kie vizitantoj povos ilin manĝigi, tuŝi kaj eĉ rajdi.

La elefanto-parko aspektos kiel azia ĝangalo, kiel oni jam faris sur insulo Balio en Indonezio. La parko, malfermata en 2008, kostos 1,1 milionojn da eŭroj, kaj laŭplane allogos jare 400 000 vizitantojn.

AMik



MELBOURNE ZOO



Decido aŭtok(r)ata

Sveltiĝos la jerusalema leono: temas ne pri bestoĝardena katego sed pri simbolo videbla sur la urba blazono. La jerusalema leono tro similas al tiu de la franca aŭto-kompanio Peugeot. Ironie, oni unue rimarkis la similecon, kiam eksterland-

anoj ricevis medalojn pri la evoluo de la urbo: la medalo-ceremonio estas sponsorita ĝuste de la sama firmao. Tial la urba registaro decidis malgrasigi la jerusaleman katon, por ke ĝi ne estu konfuzata kun ĝia franca kuzo.

AMik



Kiu el la du homoj estas la litova ĉefministro Gediminas Kirkilas? Kaj kiu Stanislovas Jomantas, oficisto ĉe la flughaveno en Palanga? Fakte la maldekstra homo estas la ĉefministro – sed ekde la enoficigo de Kirkilas la vivo de Jomantas pli kaj pli komplikiĝis. Ne nur laŭvizaĝe sed ankaŭ laŭstature Jomantas similas al la ĉefministro. Tial homoj volas lin alparoli pri politiko kaj aliaj aktualaj aferoj. „Mi kreskigos mian barbon aŭ entute forrazos ĝin por ĉesigi ĉi tiun konfuziĝon”, ŝercas la 47-jaraĝa Jomantas, kiu antaŭ tri jaroj eniris la parlamentejon la 1an de aprilo, ŝercotagon, kaj okupis la lokon de Kirkilas. Neniu rimarkis, ĝis envenis la ĝusta Kirkilas.

LAST/pg



Kontribuojn por la rubriko Moderna vivo de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

UKRAINIO

Lviv – kaj mort'

La ukraina urbo Lviv festis en septembro 2006 sian 750-jariĝon. Ene de duonjaro venis multaj turistoj, inkluzive de proksimume 1,5 milionoj da poloj, el kiuj (laŭ informoj de limgardistoj) 70 % estis virinoj.

Tamen klare estas, ke kelkaj virinoj ne venis por ĝui la vidindaĵojn de Lviv. Ili venis, ĉar en Pollando, ekde la fino de la 90aj jaroj abortigo estas malpermesita (krom se estas minacata la vivo de patrino aŭ bebo). Tial polinoj vizitas aliajn eŭropajn landojn, se abortigon ili celas.



Multaj turistoj vizitas la ukrainan urbon Lviv por abortigo.

Kliniko

Do polinoj el la orienta parto de sia lando vizitas ne nur Lviv, sed ankaŭ aliajn ukrainajn urbojn, ekzemple Ivano-Frankivsk aŭ Ternopil. En Ukrainio kostas abortigo en ŝtata hospitalo aŭ privata kliniko ekvivalenton de proksimume 100 usonaj dolaroj. En Pol-

lando, se esceptokaze kaj kontraŭleĝe estus farata la operacio, la kosto egalus al 5000 dolaroj.

Ironie, dum kelkaj pensas pri abortigo, aliaj pensas pri nasko. Lastatempe 20-jara Aljona Savickaja, el la ukraina provinco Ĵitomir, naskis infanon, es-

tante senkonscia. Ĉar ne venis tuj al la patriniĝonto kuracisto, ŝi perdis konscion – kaj rekonsciiĝis nur tri semajnojn post sukcesa nasko. Raportis gazetoj, ke jen la unua fojo, ke naskis virino senkonscia.

Dmitrij CIBULEVSKIJ/pg

INSTRUADO

Senkosta servo multe kostas

Ĉiu ŝtato zorgas, ke civitanoj obeu al la leĝoj. Sed ĉu ŝtatoj obeu al siaj leĝoj, estas alia afero. En Ukrainio akceptite estas en 1996, laŭ paragrafo 53 de la konstitucio, ke ĉiuj civitanoj rajtas ricevi senpagan klerigon en mezaj, profesi-teknikaj kaj superaj ŝtataj lernejoj.

Tamen klare estas, ke almenaŭ en superaj lernejoj pli ol duono de la studantaro ne lernas senpage, sed elpoŝigas relative grandajn sumojn. Efektive klerigado en Ukrainio estas dividita en du partojn: la buĝetan kaj kontraktan.

La „buĝetuloj” neniam pagas, sed la „kontraktuloj” pagas depende de la universitato kaj de la fako. Ekzemple en la dua plej granda urbo en Ukrainio, Ĥarkovo, studentoj pri konstruado/arĥitekturo ĉe tehniko universitato pagas jare ekvivalenton de ĝis 470 eŭroj.

Tamen studentoj pri juro pagas pli ol trioble – ĝis 1560 eŭrojn. Samaj diferencoj ekzistas ĉe aliaj, neŝtataj universitatoj. Samtempe memorindas, ke jara salajro en Ukrainio ĝenerale ne atingas multe pli ol 1000 eŭrojn.

Dmitrij CIBULEVSKIJ/pg

Lardo-ardo

Ekzistas en la mondo multaj konkursoj. En Ukrainio, tamen, oni elpensis ankoraŭ unu. En la urbo Lucjk (regiona centro de la nord-okcidenta parto) okazis konkurso pri rapida manĝo de lardo. La venkinto, loĝanto de Lucjk, ene de 30 minutoj sukcesis konsumi unu kilogramon da lardo, delikataĵo de Ukrainio, plus panon kaj cepojn. Dum la konkurso estis inaŭgurita maketo de monumento, dediĉita al la porko kaj konstruota en Lucjk.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

MADAGASKARO

Aŭtokomercio pli strikte regulita

En la centro de la ĉefurbo de Madagaskaro estas parkataj belaj aŭtoj importitaj el Eŭropo, Sud-Afriko kaj Reunio. Fojfoje temas pri negoco, kiu eskapas el la ŝtata kontrolo.

Varias la tipo de la veturilo mendata de la klientaro: ŝarĝaŭto por konstruistoj kaj riĉaj kamparanoj, bus(et)o por transportistoj kaj plezura aŭto por la ceteruloj. Aŭtonegocistoj celas meznivelan klientaron (kuracistojn, komercistojn, kadrojn de ŝtatoŝefoj) por la plezuraj aŭtoj. Por faciligi la taskon de la aĉetanto, la aŭto jam portas la ŝtatan identignumeron. Prezo estas pli-malpli alirebla por tiaj klientoj. Bonstata

franca dizela ŝarĝaŭteto *Renault Express* kun kvin sidlokoj, ekuzita en 1998, kostas proksimume 6 milionojn da arjaroj (1 eŭro = 2600 arjaroj). Sed la prezo de tre luksa aŭto kiel *BMW* aŭ *Mercedes* alproksimiĝas al 200 milionoj. Ĝenerale, la aĉetanto devas fari iom da riparado. Tre ŝatata de transportistoj estas aŭto el Germanio pro ĝia kvalito. Aŭto el Reunio estas malpli dezirata, ĉar ofte ĝian karoserion jam korodis la tiea mara vento.

Antaŭe estis facile eĉ por ordinario importi malnovan aŭton, sed nun la dogano iĝas pli postulema. Importisto devas kunlabori kun internacia kontrolfirmao *SGS* por kontroligi la aŭton. La kontrolado kostas po minimume 30 eŭrojn. Kaj depende de la rezulto de la kontrolado oni pagas doganimposton, kiu fojfoje estas pli alta ol tiu de nova aŭto, ĝis 80 % de la fakturprezo. Plie, la registaro emas „puni” la malnovajn aŭtojn je la nomo de la mediprotektado. Tial falas la importadkvanto de malnovaj aŭtoj kaj la prezoj en la loka merkato altiĝas. Koncesiuloj vendantaj novajn aŭtojn profitas el tiu situacio, kaj ĉiujare plialtiĝas ilia vendado. Tamen, multaj profesiuloj plendas pro la malfavora sinteno de la ŝtato. Ĝi ja ne favoras la transportistojn, kaj koncesiuloj ne ĉiam proponas krediton al ili. Sekve, nur tre riĉa homo havas la eblon aĉeti novan aŭton.

Alia profesio, kiun vivigas la malnovaj veturiloj, estas tiu de meĥanikisto. En ĉiu stratangulo staras garaĝo por rapida aŭtoriparado. Kaj hindopakiŝtanoj riĉiĝas rapide pro vendado de novaj, sed tamen fuŝaj aŭtopecaroj.

Malbona surprizo por koncesiuloj estas la alveno de aŭtoj fabrikitaj en Ĉinio. Dum la lasta aŭto-ekspozicio en la ĉefurbo iu ĉia-terena 4x4 de ĉina marko aĉetebliis kontraŭ nur la triona prezo de samtipa aŭto el Eŭropo aŭ Japanio. Sed aliflanke, malagaso plu timas la kvaliton de la ĉina produktaĵo.

FIDILALAO Henriel



FRANK WOUTERS

Internaciaj respondkuponoj ĉu fino alproksimiĝas?

El ekonomia vidpunkto la sistemo de internaciaj respondkuponoj (IRK) estas unikaĵo: per ĝi eblas protekti sian investon kontraŭ inflacio kaj kontraŭ valutŝanĝoj. Tamen, pro novtipaj komunikiloj la IRK riskas malaperi.

Kiel oni aranĝu, ke eksterlanda korespondanto ne devu elspezi monon por respondi al letero? Ekde 1907 eblas aĉeti en poŝtoŝtanco IRK, kiun oni aldonas al la korespondaĵo kaj kiujn eksterlandanoj povas interŝanĝi kontraŭ poŝtmarko por internacia letero. Tiel tiu nur devas porti la malgravajn kostojn de papero kaj koverto. La sistemo de la Universala Poŝta Unio (UPU) funkcias ĉie; krome estas kelkaj sistemoj limigitaj al iuj regionoj, ekzemple la eksaj brita kaj franca imperioj.

Ĉar la IRK restis ĉiam validaj kaj ĉie estis proksimume samvaloraj (nome afranko de internacia letero), oni en praktiko malofte ŝanĝis ilin, sed konservis ilin por iu posta uzo. Ili ofte estis uzataj kiel internacia valuto por malgrandaj pagoj, ekzemple membrokinto de asocio aŭ aĉeto de libro.

IRK neniam estis grandskale uzataj, sed nun ilia ekzisto estas minacata de du flankoj. Unuflanke retpoŝto pli kaj pli forpuŝas la tradician paperan leteron, ankaŭ en triamondaj landoj. Aliflanke, en nuntempa rapida ŝanĝiĝanta ekonomio, pagilo eterne stabila kaj valida iĝis anakronismo.



Malnova (sube) kaj nova (supre) IRK

Eĉ en grandaj poŝtoŝtancoj oni riskas renkonti ĝicetistojn, kiuj neniam vidis IRK kaj nur post iom da diskutado kaj informpetado pretas akcepti ilin. Sur novtipaj IRK estas presita validoperiodo, kiu ĉiufoje estas malpli longa.

Kvankam oficiale ne estas planoj por nuligi la sistemon de IRK,

antaŭvideblas, ke ĝia uzo post kelkaj jaroj iĝos tiel malofta, ke ĝia pluekzisto ne havos sencon. Estas do konsilinde interŝanĝi sian stokon de IRK kaj ne plu meti ilin en tirkeston por iu posta uzo. Ĉe novtipaj IRK oni nepre atentu pri la validodato.

Roland ROTSAERT

www.upu.int/irc/fr/index.shtml: oficialaj paĝoj de Universala Poŝta Unio.
www.couponreponse.fr: paĝoj de privata persono kun pli detalaj informoj.

ENERGIO

Nuklea energio restu en Litovio

El la du Ĉernobil-tipaj reaktoroj de la nuklea centralo en Ignalina la unua jam estis fermita la 31an de decembro 2004 kaj la dua estas fermota fine de 2009. Tio estis la kondiĉo por aliĝo de Litovio al Eŭropa Unio. Tamen, Litovio por sia elektroprovizo ege dependas de nuklea energio.



En la nuklea centralo de Ignalina.

Estroj de energiaj kompanioj de la tri baltaj landoj – *Lietuvos energija* el Litovio, *Eesti Energia* el Estonio kaj *Latvenergo* el Latvio – interkonsentis pri konstruo de nova nuklea centralo en Ignalina kaj financado de konstrulaboroj. Ĝi ekfunkcios ĉirkaŭ la jaro 2015 kaj produktos malpli multekostan energion por baltaj landoj, tiel malpliigante la energian dependecon de Rusio. La planojn ankoraŭ devas aprobi registaroj kaj parlamentoj de la tri landoj.

Oni planas, ke la nova centralo estos konstruata sur la loko de la tria, planita sed neniam finkonstruita, reaktoro. Ĝia projektado daŭrus kvar jarojn. La kosto estos ĉirkaŭ 10,36 miliardoj da eŭroj. Sian intencon pri partopreno en la konstruprojekto jam esprimis la germana energia konzerno *E.ON*, kaj siajn nukleajn teknologiojn proponas la japanaj kompanioj *Mitsubishi* kaj *Mitsubishi Heavy Industries*, la franca konzerno *Areva* kaj la kanada *AECL*. El 26 tipoj de nukleaj reaktoroj estis

elektitaj 11, kiuj observas ĉiujn regulojn. Inter ili estas ankaŭ rusaj reaktoroj.

Konsilistoj asertas, ke la kompanioj de la tri baltaj landoj estas kapablaj financi la konstruon de reaktoro kun potenco de 1600 megavatoj. Ne estas klare ankoraŭ, kiom da reaktoroj necesas. Ĉi-momente en Ignalina funkcias unu reaktoro kun potenco de 1350 megavatoj. Kiam en la centralo funkcias du reaktoroj, ilia potenco atingis 3000 megavatojn.

FINNLANDO

Krozi en glacio

Finnlando havas naŭ glacirompilojn, kiuj laŭbezone helpas ŝipojn aliri 23 havenojn de la Finna kaj Botnia Golfoj en la Balta Maro. La glacirompiloj estas provizitaj per plej moderna komunikadtekniko, satelitaj telefonoj, Interreto uzantaj la altajn radiofrekvencojn. Vintre oni ricevas krom regulaj avertoj ankaŭ urĝajn helpopetojn de ŝipoj, sciigojn pri veterŝanĝiĝo kaj stato de glacio. Somere pluraj el la glacirompiloj plenumas aliajn taskojn. Ili levas pezajn ŝarĝojn de la marfundo, priservas marajn petrolkampojn kaj borstaciojn, metas kaj prizorgas komunikadkablojn kaj tubojn sur la fundo, helpas ŝipojn ĉe ankroproblemoj. Ĉiu glacirompilo havas sian navigadareon.

Glacirompilo serve al turistoj

Ĉe la haveno de lapona urbo Kemi en la norda parto de Botnia Golfo ankras glacirompilo SAMPO (la nomo signifas *magian riĉigilon* kaj devenas de la finna epopeo *Kalevala*). Ĝi estas konstruita en 1961, rompis glacieron dum 30 jaroj kaj poste fariĝis krosŝipo por turistoj. Nun tiu „emerito” servas ankaŭ kiel konferencejo, festejo kaj restoracio kaj povas akcepti 180 personojn.

Vintre la vetero en la plej norda parto de Botnia Golfo estas severa kaj rapide ŝanĝiĝas. La aertemperaturo varias de +20 gradoj en la periodo marto-aprilo ĝis -40 gradoj en decembro-februaro. La ŝipanaro de SAMPO, konsistanta el 16 personoj, estas trejnita labori en tiuj veterkondiĉoj. Al la pasaĝeroj oni disponigas vestojn por ĉia vetero. La restoracioj sur la glacirompilo ofertas laponajn kaj internaciajn frandaĵojn samkiel distran programon. En la ŝipa vendejo aĉeteblas altkvalitaj manlaboraĵoj kaj memoraĵoj. Dum 4-hora krosado tage en la periodo



decembro-aprilo la veturantoj ekkonas la motorojn, komandojn kaj funkciadon de la krosŝipo, kiu povas trapenetri eĉ 8 metrojn dikan premlacieron.

Dum la krosado la glacirompilo haltas en la maro por ellasi kuraĝemulojn, vestitajn per akvoimunanj varmokostumoj, enakviĝi aŭ pli precize surakviĝi, ĉar pro la speciala vesto ili nur flosas. Dume aliaj pasaĝeroj elŝipiĝas por promeni sur la ĉirkaŭa glacikampo, kie ili povas ankaŭ daŭrigi la aventuron, veturante per hunda aŭ motora sledo aŭ per helikoptero. Ĉiuj partoprenantoj en ambaŭ aranĝoj fine ricevas atestilon pri sia kuraĝo, manifestita en la arktaj kondiĉoj.

Pri la glacirompilo SAMPO estas retpaĝo en 10 lingvoj: www.sampo-tours.com

SALIKO



Reto 2.0



NATE COULL

Reto 2.0 (angle *Web 2.0*) estas neformala nomo por la plej lastaj evoluoj en la TTT (Tut-Tera Teksaĵo). Tiu nomo ekuziĝis en konferenco en oktobro 2004. Oni rimarkis, ke en la Reto aperas interesaj novspecaj aplikajoj, kiuj estas tre utilaj por ordinaraj uzantoj.

Kiam Tim Berners-Lee inventis la TTT, li intencis, ke ĝi estu medio por kunlaborado, tiutempe de sciencistoj, sed poste de ĉiaj homoj. Li eĉ verkis retfoliumilon, kiu ebligas al la uzanto redakti la retpaĝon vidatan, ne nur vidi ĝin. Diversaj kompanioj ne ŝatis tiun ideon kaj puŝis la ideon, ke la Reto estu por publikigado kaj pasiva legado, ne por kunlaborado. Grandaj kompanioj provis kapti la Reton kaj pagigi uzantojn pro ĝia uzado. Dum la 1990aj

jaroj tio fariĝis pli ofta afero, sed en la jaroj 2004-2006 la tendenco estas, ke la Reto pli kaj pli estas por senpaga libera uzado. Nun estas pli facile uzi la Reton ne nur por informaj celoj, sed ankaŭ por kunlaboraj celoj.

La Semantika Reto

La Semantika Reto estas metodo por doni signifon al terminoj en retpaĝoj. Tio ebligas pli precizan indeksadon, ol eblas per simpla vorta kongruo. Unu bona ekzemplo estas la retejo *nzetc.org*, kiu publikigas (senpage) historiajn dokumentojn, ekzemple la eksan revuon *Te Ao Hou* (La nova mondo) kaj diversajn dokumentojn pri Nov-Zelando kaj la dua mondmilito. Tamen la Semantika Reto postulas multan kleran laboradon por enmeti etiketojn. Tial

ĝi ankoraŭ ne fariĝis tre uzata. Nun la Semantika Reto ŝajne estas preterpasa de aliaj evoluoj.

Liberaj programaroj

Dum la lastaj dek jaroj estiĝis multaj projektoj por verki liberajn programojn. Nuntempe la nombro estas centmiloj. Estas ankaŭ multaj projektoj, kiuj rilatas al Esperanto, ekzemple la projekto produkti esperantlingvan oficejan programaron. Teamo de esperantoparolantoj tradukas la programaron *OpenOffice.org* en Esperanton kun la intenco, ke ĝi estu havebla en 2006. Aldone al tio, oni nun povas havi komputilon kaj uzi ĝin ĉefe en Esperanto. La mastruma sistemo *Linukso* kun la labortablo KDE estas havebla en Esperanto, kaj ankaŭ multaj programoj estas haveblaj kun la menuoj kaj helpo en Esperanto. Ŝajnas, ke multaj novaj aplikajoj en la Reto estas tie pro la influo de la tendenco al liberaj programaroj.

Kalendaroj de eventoj

Jam de kelkaj jaroj oni havas en Esperantujo la retejon *eventoj.hu*, kiu listigas ĉiujn eventojn, pri kiuj oni informis la prizorgantojn. Nun ekzistas ankaŭ la *Kalendaro de Ĝangalo* gxangalo.com/modules/piCal.

Lastatempe aperis retejoj, kiuj permesas al praktike iu ajn rekte aldoni informon pri okazontaj eventoj, ekzemple *eventful.com* kaj *upcoming.org*.

Uzantoj estas uzatoj

La grandegaj sukcesoj de la antaŭa epoko estas tiuj projektoj, kiuj ekspluatis la intelekton kaj kunlaboremon de uzantoj. *Yahoo!* (*Yahoo.com*) estas katalogo de la Reto farita de milionoj da uzantoj.

Alia tre sukcesa projekto estas *Amazon.com* (*amazon.com*). Ĝi utiligas uzantojn por recenzi verkojn, kaj ĝi informas, kiujn librojn aĉetis aliaj uzantoj, kiujn interesas la sama temo. Aliaj librovendistoj en la Reto ŝajne ne tiel sukcesis, ĉar ili ne havas tiom da aktualaj informoj: ili ne komprenis la valoron, kiun la uzantoj povas alporti.

En la Reto utilas la ligiloj, kiujn aŭtoroj de reta informo enmetas en siajn paĝojn. *Google* (*google.com*) ekspluatas tiujn ligilojn por rangigi ĉiujn paĝojn laŭ sekreta formulo, kiu ŝajne inkluzivas, kiel ofte ĉiu paĝo estas modifita, kaj kiel ofte ĝi estas referencita. Kiam uzantoj serĉas informon per *Google*, ili gajnas pro la valoro, kiun ĉiuj uzantoj aldonis al tiu indekso.

Vikioj

Wikipedia (*Wikipedia*) estas reta enciklopedio iniciatita de Jimmy Wales, profesie helpata de nur tri stabanoj. Ĉiuj aliaj homoj estas bonvenaj kontribui al ĝi. Oni eble pensus, ke tian retejon difektus la malkontentuloj, kiuj verkas virusojn, sendas rubpoŝtaĵojn kaj faras aliajn malbonaĵojn por la Reto. Tamen, tio malofte okazis ĝis nun. Konkurantoj de *Wikipedia* asertas, ke ĝi enhavas multajn erarojn, sed studo publikigita de la revuo *Nature* (2005-12) montris, ke ĝi estas preskaŭ same fidinda kiel *Encyclopædia Britannica*. *Wikipedia.org* estas unu el la cent plej popularaj retejoj en la mondo kaj ankoraŭ plipopulariĝas, ĉar ĝi pliampleksiĝas tagon post tago. Ĝi jam enhavas pli da informoj, ol la reta versio de *Encyclopædia Britannica*. *Wikipedia* havas pli ol du milionojn da paĝoj en pli ol 200 lingvoj. La revuo *Newsweek* (2006-01-09, p. 38) taksas, ke *Wikipedia* estas la plej granda unuopa fonto de informoj en la historio de la mondo.

En januaro 2006 *Wikipedia* nombris 31 000 esperantajn paĝojn. La rango de Esperanto inter la 212 lingvoj tiam estis la 16a. Oni povas kompari tion kun la angla kun 935 000 paĝoj (rango 1a), Ido kun preskaŭ 13 000 (31a), Interlingua kun 2860 (59a) kaj Volapuko kun 46 (131a). La relative alta rango de Esperanto rezultis el la konstanta laborado de multaj fervoruloj, kiuj kon-

tribuas per artikoloj pri siaj fakoj, hobiaj kaj aliaj interesoj kaj korektas erarojn en aliaj artikoloj.

Post la sukceso de *Wikipedia* Jimmy Wales decidis krei similajn rimedojn por vortaroj, citaĵoj, novaĵoj kaj lernolibroj; ĉiuj estas liberaj rimedoj en la Reto. La esperantlingva *Vikivortaro* komenciĝis en majo 2004 kaj progresis ĝis 221 kapvortoj en januaro 2006. Komenciĝis ankaŭ *Vikilibroj* kaj *Vikicitaĵoj* en Esperanto.

Imite al la ekzemplo de *Wikipedia* estas grandega nombro da retejoj, kiuj nun havas propran vikion, tre facile uzeblan de iu ajn per reta foliumilo. Multaj retejoj pri libera programaro havas vikion, kie uzantoj dokumentas la koncernan programon.

Novaj – digg

La novaĵoj en *digg.com*, aldonataj de uzantoj, temas ĉefe pri teknologio. En marto 2006 enestis nur du eroj pri Esperanto: pri *lernu.net* kaj pri la nova televida kanalo esperanta. Ĉiu nova ero metiĝas en provizora vico; uzantoj povas viziti ilin kaj marki tiujn, kiuj plaĉas. Kiam novaĵero ricevis sufiĉe da aprobaj markoj, ĝi moviĝas al konstanta loko. Se ero ne ricevas sufiĉan subtenon, ĝi aŭtomate malaperas.

Babilejoj

Babilejojn oni uzadas de kelkaj jaroj. En tia retejo oni povas tajpe babili kun aliaj babilemuloj, sed ili ebligas ne nur distran babiladon, sed ankaŭ kunlaboradon. *Babilejo.org* estas ekzemplo de tia retejo; ĝi funkcias per multaj lingvoj inkluzive Esperanton.

La Esperanto-klubo de Austin (Teksaso, Usono) aranĝis laborfeston per *babilejo.org* dum la semajnfino de la 6a ĝis la 8a de januaro 2006 kun la celo kompletigi la novan retejon de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA). Poste la nova retejo ekhavis modernan enhav-administran sistemon, kiu permesas al ĉiuj membroj de ELNA publikigi artikolojn.

Blogoj

La nomo *blog* devenas de la angla esprimo *web log*. Ĝi estas virtuala



taglibro, legebla por iu ajn aŭ nur por registritaj legantoj, laŭ la prefero de la aŭtoro. Pluraj retejoj disponigas servon, per kiu iu ajn povas verki propran blogon.

Blogoj ofte havas funkcion, per kiu legantoj povas aldoni komentojn pri la enhavo de la blogo, kaj la rezulto estas babilado inter la bloganto kaj la legantoj. Ĉar blogoj estas ofte ŝanĝataj, ili atingas altan rangon en la serĉsistemo de *Google*.

Blogoj unue aperis en 1996, sed pro la novspecaj blogiloj, kiuj estas pli facile uzeblaj, la nombro de blogoj multe kreskis dum la lastaj kvin jaroj. Nun en la Reto aperas pli ol kvardek mil novaj blogoj ĉiutage. En la komenco de 2006 proksimume 50 tage estis en Esperanto.

Esperantaj blogoj troviĝas ĉe multaj retejoj, ekzemple ĉe *liberafolio.org*; *e-planedo.kerno.org*; *gxangalo.com/modules/weblog/*; *bertilow.com/blogo/*; *skribitaj-pensoj.blogspot.com*.

Nova retindekso – StumbleUpon

stumbleupon.com estas retejo, kie oni povas doni kaj ricevi proponojn pri retejoj, kiuj temas pri diversaj aferoj. Komence oni devas instali ilbreton por la foliumilo *Firefox*. Poste oni elektas temon kaj esploras. Oni povas ankaŭ proponi ligilojn por aliaj retemuloj, pri-notante opinion pri la retejo – ĉu ĝi estas utila aŭ ne. La rezultoj de serĉoj estas ordigitaj laŭ la interesoj de ĉiu uzanto. Kiam oni serĉis pri Esperanto per *stumbleupon.com* en januaro 2006, oni ricevis ĉirkaŭ 18 milionojn da trafoj. ►

► Novspeca indekso – *del.icio.us*

Alia komuna indekso estas *del.icio.us* (la nomo signifas „delektinda” en la angla). Ties servilo konservas legosignojn pri la favorataj retejoj de uzantoj. Ĉiu uzanto povas aliri siajn proprajn legosignojn ĉe iu ajn komputilo. Kiam oni aldonas retejon al la propra listo, oni povas vidi la uzantonomojn de tiuj, kiuj listigis la saman retejon. Eblas limigi aliron al la propraj legosignoj; se ne, aliaj uzantoj povas legi ilin. *Del.icio.us* instigas uzantojn prinoti ĉiun legosignon per etikedo unuvorta, kiun ĝi uzas por enklasigi retejojn kaj plifaciligi al aliaj trovi ilin. Uzantoj povas difini novajn etikedojn. Iuj argumentas, ke tia neformala enklasigado (angle *folksonomy* – klasifiko de ordinaruloj) estas pli fleksebla kaj utila, ol tradiciaj sistemoj. Tamen, en lingvo kun multaj

sinonimoj kaj idiotismoj, atendu multajn maltrafojn kaj mistrafojn.

Rete montri fotojn – flickr

Jam ekzistas retejoj, kie oni povas konservi proprajn fotojn kaj ebligi, ke aliaj rigardu ilin. *Flickr.com* estas novspeca retejo por montri fotojn. Oni povas limigi al listigitaj homoj la permeson rigardi la fotojn aŭ lasi ilin publikaj. Oni povas aldoni etikedojn por plifaciligi serĉadon kaj permesi al aliaj homoj aldoni komentojn. Oni povas trovi multajn fotojn kun la etikedo „Esperanto”. Simila retejo por vidbendoj estas *vimeo.com*.

Hibridaj retaj aplikajoj

Kelkaj retemuloj malkovris, ke ili povas kombini la rezultojn de diver-

saj retaj servoj por produkti hibridan aplikajojn (angle *mashup*). Ekzemple, iu kombini informon pri luotaj hejmoj per unu aplikajo kun mapoj el aplikajo de *Google* por montri sur la mapo la situon de ĉiu luota hejmo. Poste li prezentis sian hibridan aplikajojn en la Reto, kaj ĝi fariĝis tre populara. Alia hibrido montras en unu paĝo la prezojn de libroj reklamitaj de *Amazon.com* kaj de kelkaj konkurantaj librovendejoj. *Amazon* komence provis malhelpi tiun retejon, sed poste ŝanĝis tiun decidon.

Hibridaj aplikajoj estas alia rimedo por uzi la kontribuojn de uzantoj por plibonigi la Reton. La plejmulto de la novaj rimedoj en Reto 2.0 estas kreitaj de unuopuloj, ne de grandaj kompanioj. Jen tre grava tendenco en Reto 2.0.

Ankaŭ kelkaj gravaj komercaj aferoj komenciĝis en la manoj de individuoj. Ekzemple, la novzelandano Sam Morgan starigis la retejon *trademe.co.nz* en 1999 por faciligi vendadon de diversaj varoj per reta aŭkcio. *TradeMe* (Brokantu min) havas nur 55 dungitojn. Morgan kaj la malmultaj aliaj akcituloj vendis sian retejon en marto 2006 al la granda kompanio *John Fairfax Holdings* kontraŭ 700 milionoj da novzelandaj dolaroj (ĉirkaŭ 385 milionoj da eŭroj). *Fairfax* [féafaks] volis aĉeti la retejon, ĉar ĝi jam posedis ĵurnalojn, kiuj konkurencas kontraŭ retaj aŭkcioj. *Fairfax* agnoskis, ke ekzistas gravaj malhelpoj por aliaj kompanioj, ĉar la unua kompanio en tiu merkato (*TradeMe*) estas jam establita. *Fairfax* deziras superregi tiun merkaton en Nov-Zelando.

Potenco por la uzantoj

La Reto dependas de interfunkcivado. Reto 2.0 estas la epoko de blogoj, vikioj, kunlaborado, hibridaj aplikajoj kaj libera programaro. Sukceso en la Reto ne plu dependas de riĉaj subtenantoj. Volontulaj kaj aliaj neriĉaj grupoj troviĝas nun en pli bona situacio, ol iam antaŭe, por informi la mondon pri siaj celoj kaj agado kaj por kunlaborigi homojn dise tra la mondo.

D. E. ROGERS

INTERRETO

Kiom grandas la virtuala mondo?

En novembro 2006 la kvanto de registritaj TTT-ejoj atingis 101 435 253 – je 3,5 milionoj pli, ol monaton antaŭe. Tiel raportas la kompanio *Netcraft*, kiu esploras la virtualan mondon. Ĉi tie estis kalkulitaj nur tiuj TTT-ejoj, kiuj enhavas iun informon. El tiu grandega kvanto, tamen, pli-malpli regule renoviĝas 47-48 milionoj da retejoj. Plej rapide kreskas la virtuala mondo en Usono, Germanio, Ĉinio, Sud-Koreio kaj Japanio.

La TTT-ejoj estis kontrolitaj per speciala robot-programo, kiu malkovris, ke 60,3 % de tiuj TTT-serviloj, kiuj reeĥis al la programo, estas regataj de la libera programo *Apache*, kaj nur 31 % el ili baziĝas sur serviloj de *Mikrosofto*.

Ankoraŭ en majo 2004 la kvanto de TTT-ejoj estis nur iom pli ol 50

milionoj; por duobliĝo necesis nur 30 monatoj. Specialistoj opinias, ke tia kresko ĉefe okazis pro TTT-ejoj, kiuj aŭ estas blagejoj (lokoj por libera skribado pri iu ajn temo) aŭ servas al malgrandaj entreprenistoj. Ja dum la lastaj du jaroj pli facile eblas perlabori monon pere de TTT-ejo (jam ekzistas lokoj en la mondo, kie, se iu entrepreno ne havas TTT-ejon, ĝi kvazaŭ ne ekzistas), kaj ankaŭ konstrui TTT-ejon ne estas problemo.

Jen dinamika kresko de la virtuala mondo: en 1997 ekzistis 1 miliono da TTT-ejoj; en februaro 2000 jam estis registritaj 20 milionoj; maje 2004 – 50 milionoj; aprile 2006 – 80 milionoj kaj aŭguste 2006 – 90 milionoj.

AMik

La ĉefaj murdistoj de HIV-infektitoj



Jam preskaŭ kvaronjarcenton aidoso daŭre etendiĝas sur la planedo, alportante sennombrajn suferojn kaj viktimojn. Nuntempe la nombro de infektitoj per HIV, la imun-detrua viruso, en la mondo oficiale superas 40 milionojn. Ĉirkaŭ 30 milionoj jam pereis pro aidoso. Aidoson jam oni povas egaligi al armilaro de amas-mortigado. Aparte minaca la situacio fariĝis sur la afrika kontinento, kie en pluraj regionoj estas infektitaj pli ol 15-20 % el la loĝantoj. Daŭre pligrandiĝas la epidemio en orienta Eŭropo. En Rusio oficiale estas registritaj pli ol 330 000 HIV-infektitoj, sed fakte, laŭ informo de rusaj epidemiologoj, tiu nombro verŝajne superas unu milionon.

Malgraŭ tio, ke nuntempe ekzistas kuraciloj, kiuj malgrandigas la kvanton de virusoj en la organismo kaj haltigas la evoluon de la malsano, la plimulto de la HIV-infektitoj ne povas ricevi modernan kontraŭvirusan terapion pro ĝia multekosteco. Do, post kelkaj jaroj, se ilia situacio ne ŝanĝiĝos, ĉe multaj HIV-infektitoj, la malsano transformiĝos en la stadion de aidoso kaj aperos simptomoj de tiel nomataj aidoso-rilataj malsanoj. Precize ekde tiam HIV-infekto nomiĝas aidoso. Kio estas la kaŭzo de tiaj malsanoj?

Normale ne-patogenaj mikroorganismoj

Apud ni – en akvo, aero, grundo ktp – vivas multenombraj mikroorganismoj. Multaj el ili estas endogenaj, t.e., ili vivas interne de organismoj – en buŝoj, intestaroj ktp. La plimulto de tiuj ne kaŭzas malsanojn, tial ili nomiĝas nepatogenaj aŭ kondiĉe patogenaj. Sed ili ne estas danĝeraj, precipe pro la imuna sistemo de la organismo. Jam antaŭ la apero de aidoso, al kuracistoj estis konataj imundifektaj statoj – rezulte de denaskaj genetikaj difektoj, rezulte de radiado, kaj post transplantado de organoj, kiam malsanuloj uzis



specialajn medikamentojn, kiuj subpremas imunan reagon por preventi malakcepton de transplantitaj organoj. Sed tiuj kazoj estis sufiĉe maloftaj kaj tial ne prezentis grandan minacon por la homaro.


La situacio radikale ŝanĝiĝis pro la epidemio de aidoso, kiam reduktado de imuneco ĉe malsanuloj akiris amasan karakteron. Tiu transformo de normalaj benignaj mikroboj inspiras la terminon „oportunistaj malsanoj”. Estiĝis unika kazo: la viruso de aidoso mem reproduktiĝas en ĉeloj de la imuna sistemo kaj neniigas ilin. Dum aidoso, precipe suferas la ĉela imuneco – detruigita la tiel nomataj t-limfocitoj. Pro foresto de granda kvanto de t-limfocitoj, la organismon atakas multnombraj mikroboj, de kiuj la plimulto apartenas al protozooj kaj fungoj (miceto). La viruso, kiu plej ofte minacas malsanulojn, estas la herpet-viruso.

Sube ni koncize priskribas kelkajn el la plej danĝeraj aidoso-rilataj malsanoj.

Protozoaj kaj micetaj malsanoj

Inter protozoaj malsanoj estas pneŭmocista pneŭmonio, aŭ pneŭmocistozo, kaŭzita de protozooj (*pneumocystis carinii*), kiu evidentiĝas ĉe 60-70% de la infektitoj. La malsano estis diagnozita ĉe la plej unuaj aidoso-malsanuloj, mortintaj en Usono en 1981. Homoj infektiĝas aergute (tio signifas transdonon per malgrandaj gutetoj en la aero, ekzemple pro tusa-do aŭ ternado). Por sanaj homoj, tiuj protozooj ne estas danĝeraj. Sed ĉe aidoso-malsanuloj, ili kaŭzas gravan pulmo-inflamon (pneŭmonion).

Alia aidoso-rilata protozoa malsano, toksoplazmozo, estas kaŭzita de protozooj (*toxoplasma gondii*). Homoj infektiĝas pli ofte dum kontakto kun fekaĵo de infektitaj katoj kaj manĝado ▶



► de nesufiĉe kuirita viando. En 15-20 % el sanaj homoj troviĝas tiuj protozooj. Toksoplasmoj prezentas danĝeron por embrioj kaj novnaskitoj. Ĉe aidoso-malsanuloj pli ofte toksoplasmoj trafas cerebron (encefalito) kaj okulojn (korioretinito). Inter micetozoj la plej minacaj por HIV-infektitoj estas kandidozoj. Baldaŭ post infektigo, en la buŝo de multaj HIV-infektitoj aperas multenombraj dolorigaj blankaj makuloj, inklinaĵoj al ulceriĝo (kandidoza stomatito). Sed en la stadio de aidoso, kandidozaj ŝanĝoj jam portas disvastigitan karakteron (kandidoza ezofagito, bronkito, sepo kaj aliaj).

Virusaj malsanoj

El herpet-virusaj infektoj ĉe HIV-infektitoj la plej ofte trovita estas herpeto, kaŭzita de virusoj (*herpes simplex* kaj *herpes zoster*). Malmulte da homoj neniam estas infektitaj de *herpes simplex*. Por la malsano estas tipaj dolorigaj veziketoj en la buŝo, sur la lipoj. Post resaniĝo, la virusoj restas dumvive en la ganglioj de la nerva sistemo. Por *herpes zoster*-infekto estas tipaj tre dolorigaj veziketoj sur la haŭto de la torako kaj dorso en interripaj interspacoj, ĉar estas trafitaj interripaj nervoj. La malsano aperas pli ofte ĉe maljunuloj rezulte de malfortiĝo de

imuneco (ĉe infanoj tiu viruso estas kaŭzo de varicelo). Ĉe aidoso-malsanuloj herpeto konstante recidivas kaj ofte atakas faringon, ezofagon, hepaton, cerebron kaj aliajn organojn.

Por aidoso-malsanuloj prezentas grandan danĝeron citomegalovirusoj, kiuj ankaŭ grupiĝas kun herpet-virusoj. La virusoj tiel nomiĝas, ĉar la ĉeloj infektitaj de ili estas kelkfoje pligrandigitaj (megalo = pligrandiĝo). Citomegalovirusoj transiĝas aergute, per sango, transplacente kaj alie. Kvankam la virusoj povas esti kaŭzo de gravaj anomalioj de novnaskitoj, por sanaj plenaĝuloj ili ne estas danĝeraj (antikorpoj al ili estas trovitaj en 80-90% de la plenaĝuloj). Sed ĉe aidoso-malsanuloj, citomegalovirusoj ofte kaŭzas gravajn inflamajn procezojn – en cerebro (encefalito), okuloj, pulmoj kaj aliaj organoj, kio postulas senprokrastan intensan kuracadon.

Tuberkulozo

El aidoso-asociiĝintaj malsanoj, kaŭzitaj de patogenaj bakterioj, la plej danĝera estas tuberkulozo. Sekve de imunodefekto aktiviĝas en pulmoj antaŭaj aŭ iamaj tuberkulozaj restaĵoj (pli ol triono de la monda loĝantaro tenas en la pulmoj neaktivajn tuberkulozajn bakteriojn). Ĉe aidoso-malsanuloj tuberkulozo havas inklinon al disvastiĝo. En la patologian procezon ofte entiriĝas la osta kaj nerva sistemoj, kaj la intestaro. Pro tio, ke mikroboj akiris rezistecon al multaj medikamentoj, necesas uzi por kuracado samtempe 3 aŭ 4 kuracilojn.

Pro aidoso tuberkuloza malsaneco nuntempe pligrandiĝis eĉ en multaj riĉaj landoj. En malriĉaj landoj tuberkulozo prezentas grandegan minacon por la loĝantaro, kio postulas senprokrastan enmiksiĝon kaj helpo de Unuiĝintaj Nacioj.

Tumoroj

Krom la menciitaj infektmalsanoj, al aidoso-rilataj malsanoj oni rilatigas iujn tumorojn. El ili la plej oftaj estas Kaposi-sarkomo, nomita laŭ la kuracisto, kiu priskribis la malsanon antaŭ 130 jaroj. Nuntempe sciencistoj opinias, ke la kaŭzo de la tumoroj estas herpet-virusoj de la 8a tipo, kiuj aktiviĝas pro imunodefekto. Ĝis la apero de aidoso, la Kaposi-sarkomo aperis tre malofte, kaj precipe ĉe maljunuloj. Dum aidoso, la tumoroj kutime aperas ĉe pli junaj personoj. Por la malsano estas tipaj multenombraj ruĝaj makuloj kaj nodoj sur la haŭto de vizaĝo, kapo, kolo kaj torako, kiuj baldaŭ ulceriĝas. La malsano ofte komplikiĝas kaj en la patologian procezon entiriĝas la internaj organoj.

La estonteco de aidoso

Supre ni priskribis kelkajn el la plej oftaj aidoso-rilataj malsanoj. Multajn oni eĉ nomas aidoso-indikiloj, ĉar ili suspektigas HIV-infekton jam antaŭ laboratoriaj esploroj. Estas verŝajne, ke intensa disvastiĝo de aidoso en multaj landoj povas grave malplialti la postvakcinadan imunekon de la loĝantaro al iuj jam venkitaj infektaj malsanoj, kaj malfaciligi la epidemian situacion.

Por preventi aidoso-rilatajn malsanojn inter HIV-infektitoj, necesas kiel eble plej frue komenci kaj daŭrigi modernan aktivegan kontraŭvirusan kuracadon de ĉiuj HIV-infektitoj, ne atendente malpliigi de la imuneco. Tre gravas ĝustatempe diagnozi la unuajn simptomojn de aidoso-rilataj malsanoj. Por tio, necesas pliperfektigi la sciojn de kuracistoj, konsiderante la aperon de malbone konataj malsanoj en la epoko de aidoso. Krom intensa kuracado de aidoso-rilataj malsanoj, tre gravas utiligi kuracilojn por profilaktaj celoj.

Certe, por radikala elimino de aidoso-rilataj malsanoj necesas rompi la epidemion de aidoso. Tamen la tutmonda senbrida seksemo kaj narotismo nuntempe igas tiajn esperojn nerealegblaj.

Vladimir LEMELEV

Majstra verko de aŭtoro preskaŭ nekonita

Ĉi tiu kolekto de rakontoj, el kiuj nur manpleneto aperis antaŭ nun en kelkaj revuoj, ŝajnas esti la sola literaturo, kiun iam ni havos, de preskaŭ neniam renkontita aŭtoro nialingva. Pri Sen Rodin ni scias preskaŭ neniom: nur ke la nomo estas pseŭdonimo de Filippo Franceschi, itala esperantisto, konata pro siaj lingva kaj traduka talentoj.¹

Mi tamen aŭdacas aserti, ke ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilágyi.

Kio karakterizas la verkojn de tiuj eminentaj literaturuloj, kiel egale ĉi tiun rakonton? Ili rigardas la vivon, bazante siajn verkojn pli-malpli sur propraj spertoj, kaj ĉerpante el tiuj epizodoj la eternan fundamente homan karakteron, same validan antaŭ kelkmil jaroj, nuntempe, kaj post kelkmil jaroj. Ĉiu rakonto konvinkas la leganton pri sia realo; ĉio efemera menciigas nur por reliefigi la esencajn animojn de la rolantoj.

Eble kelkaj ekzemploj helpas komprenigi mian konstaton. La unuaj 32 rakontoj parolas al ni pri la impresoj, faritaj al itala junulo, enamiĝinta kun sveda junulino, kiam li vizitas la hejmlandon kaj hejmvilaĝon de tiu junulino. Ĉiumonate, en taglibra stilo, li konigas al ni iun sperton, kiu markas permanente en lia memoro la etoson de tiu lando tia, kia li renkontas ĝin, kaj la homoj, kiuj loĝigas ĝin. La naturo de la spertoj multe varias; povas esti simpla karikaturo unu-du-paĝa de evento amuza, distra, malplezuriga. Povas

esti multepaĝa priskribo de spertoj kun lia dunginto, kies artista talento diversmaniere interpreteblas, laŭ onia vidpunkto. Neniam teda, ofte surpriza, troviĝas la vivo en tiu norda lando, kiel ĝin renkontas la sudlandano.

Post tiuj 32 rakontoj, kiuj ŝajne konsistigis la originalon de la rakontokolekto (en 1960 ĝi estis rekomendata de Gaston Waringhien al Juan Régulo, por eldono en la tiama serio Stafeto, sed pro diversaj kaŭzoj la eldono estis prokrastita, kaj poste ĝi ne povis realiĝi pro la abrupta morto de Régulo), sekvas 19 rakontoj el diversaj periodoj, ĉu el la tempo de la dua mondmilito, ĉu el jardekoj post la 1960a.

Inter miaj plej amataj rakontoj rangas la sinsekvaj rakontoj *Belfagor* kaj *Belfagor standardo*, en kiuj rakontiĝas sukcesa projekto, fare de kelkaj junuloj, flirtigi ruĝan standardon ĉe la plejsupro de alta, mallarĝega, kamentubo de iama fabriko. Ordonas unue la urbestro, poste la nacia registaro mem, malmunti tiun politikan manifestadon. Sed ĉiuj streboj de la polico, de la fajrobrigado, de ĉiaj istoj, fiaskas. La rakonto estas sobra, tre simpatia al la junuloj kaj ilia defio al la aŭtoritatuloj, kaj pensiga.

Tute alispeca estas la rakonto *Konflikto inter viando kaj spinacoj*, kiu prezentas la spertojn de juna knabo, vidanta la buĉadon de bestoj por la festomanĝoj, kaj naŭzata de la fiodoro de la kadavroj. Li konsekvence rifuzas manĝi viandon, ne pro filozofiaj konsideroj, sed pro la ribelo de lia korpo, kontraŭ la fetoro de la kadavraĵoj, eĉ post ilia plena kuiriĝo. Ĉiu alia en la familio amas manĝi viandon; la patrino ĉefe opinias la infanon mense malsana. Solvas la situacion nur la interveno



de parenco, honorata psikologo, kiu sukcesas konvinki la familianojn, ke vegetarismo ne estas mensmalsano.

Selekti la plej elstarajn el ĉi tiu rakontaro estas neebla tasko. Preskaŭ ĉiu rakonto estas malgranda gemo, kelkafoje granda gemo, kiu por la literaturamanto estas vere plezuriga legaĵo.

Klara preso; interna marĝeno iomete tro mallarĝa, por facile legi la tekston, sen damaĝi la gluon kuntenantan la paĝojn; belaspekta kovrilbildo.

Donald BROADRIBB

Sen Rodin: *Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, 2006. Serio Stafeto n-ro 30. 359 paĝoj gluitaj. ISBN 90 77066 22 5.

Prezo ĉe FEL: 24 eŭroj + franko

¹ Aperis de Sen Rodin la novelo *Negro iĝas nigrulo* en MONATO 2006/7, p. 11, kaj la letero, sed kvazaŭ novelo *Moderna poŝto* en MONATO 2006/4, p. 18.

Poemaro pri la vivo



Poemaro pri feliĉo, pri rememoroj, pri la naturo, multaj eroj kun ekologia inspiro. Fine poemoj pri malpaco, pri poluado, pri komerco kaj konsumado, pri atomenergio kaj Eŭropo ankaŭ apartenas al la penso de Rejna. Poezio tre simpla, jen ritma, jen senritma. Troveblas kelkaj aludoj al aliaj poetoj en ŝiaj poemoj. Rejna de Jong estas persista poetino kun aparta voĉo. Plia virina voĉo gravas, eĉ se voĉeto modesta, minora.


Chris Declerck

Paĝoj: 76; 21 cm; vinklita;
Prezo: € 10,00

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

Malutopio



Eldonejo Bero, en sia *Serio utopia*, reeldonis ĉi tiun kuriozan novelon de H. G. Wells. Konforme al la tradicia strukturo de rakontoj pri fantaziaj landoj Wells komencas per priskribo de mirinda, kaŝita, monta landeto en Andoj, kiu, pro natura katastrofo, estis apartigita disde la cetera kontinento, tiel ke neniu povis eniri, nek eliri. La landeto konsistis el tre fekunda valo, kun preskaŭ ĉio bezonata por la vivo. Sed mistera malsano atakis la malgrandnombran loĝantaron de tiu landeto, tiel ke la vidpovo de ĉiuj homoj malfortiĝis, iliaj idoj naskiĝis blindaj, kaj fine ĉio, rilatanta al la kapablo vidi, estis forgesita. Kompense pro la blindeco la aliaj sensoj de la loĝantoj akriĝis. Ilia kapablo palpi, aŭdi eĉ plej etajn sonojn, flari ktp estas nekredible granda.

Montogrimpisto trafalas neĝfendegon kaj post multa peno trovas sin en la lando de la blinduloj. Tie la geloĝantoj konvinkiĝas, ke li estas freneza, pro lia konstanta parolado pri „vido”. Kaj, malgraŭ multaj provoj fare de li, montriĝas, ke ili, per siaj akraj sensoj, povas superi lian vidpercepton.

Iom post iom li enamiĝas al knabino, kies bela aspekto egalas al ŝia karaktero beleco. Ili volas geedziĝi. Sed oni postulas, ke por ke tio estu ebla, li devos esti blindigita. Kontraŭvole li konsentas.

Tamen, preskaŭ lastmomente, la beleco de la naturo, de la montoj, de la ĉielo, bedaŭrigas lin pri lia konsento. Li eskapas, reiras al la civilizacio kaj miras pro sia iama preto akcepti blindiĝon.

„Utopieca” estas tiu Lando de la Blinduloj nur tiusence, ke malgraŭ sia plena blindeco la loĝantoj de tiu lando havas ekspertajn inĝenierojn, konstruistojn, skulptistojn, poetojn, kapablas detale detekti kaj koni direktojn ktp. Ili ankaŭ havas proprajn mitologion, religiemon, imagatan, sed detalan koncepton pri la strukturo de la „universo” (= la fermita valo, en kiu ili loĝas).

La novelo estas tre Wells-eca; kiu amas la sciencfikcion de H. G. Wells, tiu trovos ĉi tiun eldonaĵon salutinda. Ĝi estas tre bone kaj klare presita, kaj komposteraroj maloftas. La etoso de la pensomondo de Wells ĉirkaŭ la jaro 1900 estas tre evidenta.

Donald BROADRIBB

H. G. Wells: *La lando de la blinduloj*. Tradukis el la angla E. W. Amos. Dua eldono. Eld. Bero, Rotterdam, 2006. 26 paĝoj vinklitaj. Neniu ISBN indikita.

Prezo ĉe FEL: 3,00 eŭroj + afranko.



La libroj
kaj dis-

koj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33; rete: retbutiko@retbutiko.net; skajpe telefonato aŭ per www.retbutiko.net.

LITOVIO

Astrologoj progresas

Litovio estas katolika kaj sufiĉe klera lando. Malgraŭ tio ĉi tie progresas agado de astrologoj kaj diversaj futurdivenistoj, ja por multaj homoj la tago komenciĝas per legado de horoskopoj, kiuj abundas preskaŭ en ĉiu gazeto. Dume psikologoj kaj sciencistoj asertas, ke al horoskopoj, kiuj ne havas sciencan fundamenton, konfidas nur personoj sen klara mondkoncepto.

„Se antaŭe ni vivis en socio, en kiu ĉiuj estis ateistoj tamen katolikoj, nun ni vivas en socio, en kiu ĉiuj estas katolikoj tamen ne kredantoj. Rezulte personoj sen firma kaj klara mondkoncepto kvazaŭ troviĝas en griza zono. La situacion forte influas ŝamanoj, divenistoj kaj aliaj ĉarlatanoj”, tiel la popularecon de horoskopoj komprenas psikologo Gediminas Navaitis. Lia opinio, se homoj estus firmaj kredantoj aŭ ateistoj, ili ne konfidus al horoskopoj. „Se homo forte kredus al Dio, estus firma katoliko aŭ alireligia kredanto, li ne serĉus helpon kaj solvojn ekster sia religio. Se li estus forta ateisto, materiisto, des pli li ne ligus sian vivon kun dubindaj klarvidoj”, klarigis la psikologo.

Pasintsemajna horoskopo

Li proponas al tiuj, kiuj pasias pri horoskopoj, legi ne nur la hodiaŭan, sed ankaŭ la pasintsemajnan horoskopon por certiĝi, ĉu ambaŭ ne taŭgas por hodiaŭa tago. Ŝerceme li diris, ke li mem facile povus verki horoskopon, kiu taŭgus por ĉiuj. „Taŭgas diversaj kaj signifoplenaj ŝanĝoj, kies sencon probable hodiaŭ vi ne rimarkos. ‘La sekva semajno estas escepte taŭga por investado, gardu vin kontraŭ maliculoj kaj friponoj.’ (Se vi sukcese investos, vi memoros pri bonega horoskopo. Kaj se vi estos trompita, vi ankaŭ memoros pri tio, ke la horoskopo avertis pri singardo kontraŭ friponoj.) ‘Posttagmeze vi estos laca, ne forgesu zorgi pri via

ripozo kaj sanstato. Estu pli atentemaj al viaj amikoj kaj proksimuloj. Vi havas sekretan malamikon, kiu planas, kiamaniere malhelpi vin””, ironie parolis la psikologo.

Pasintjare du litovaj fizikistoj, Kazimieras Pyragas kaj Vytautas Straižys, publikigis leteron, en kiu ili penis prui la kontraŭsciencecon de la fundamento de astrologio. Ili asertis, ke la popolo kredas je tio, je kio ĝi volas kredi. „Kutime oni prezentas ĝeneralajn astrologiajn futurdivenajn, por ke tiuspecaj kredantoj tie trovu almenaŭ iome taŭgan eron. Tio, kio maltaŭgas aŭ ne realiĝas, tuj malaperas el la memoro. Tio, kio realiĝas, encerbiĝas por longa tempo. Do, po iomete formiĝas mito pri fidindeco de futurdivenaj”, tiam skribis la fizikistoj.

La psikologo reagis, aldoninte, ke forta konfido je horoskopoj ne estas bona afero. „Tio povas esti siaspeca sinprogramado. Se mi scias, ke posttagmeze ne indas fari gravajn decidojn, do probable mi ne faros tion”, klarigis G. Navaitis, kiu kredas, ke en la katolika Litovio necesus sekvi la eklezian sintenon rilate al ŝamanoj, astrologoj kaj aliaj futurdivenistoj.

Kaj la aliaj planedoj?

Dume la menciitaj fizikistoj miras, ke Litovio, kiu uzas kaj kreas modernajn teknologiojn, ne sukcesas liberiĝi de la mezepoko kun ties astrologiaj, magiaj, sorĉistaj antaŭvidoj. Ili asertis, ke la astrologiaj klarvidoj vere estas kontraŭsciencaj. Ekzemple, ĝis nun la astrologoj atentis nur la poziciojn de la suno, luno kaj kvin planedoj kaj tute neglektas la poste malkovritajn Uranon, Neptunon, Plutonon¹, asteroidojn kaj kometojn, ĉar tiuj ĉi kosmaj objektoj estis nekonataj tiam, kiam estis kreataj la astrologiaj dogmoj.

Laŭ astrologiaj reguloj, suna, luna kaj planeda influo al la homo ne depen-



das de ilia distanco ĝis la tero. Tamen la fizikistoj demandas, kial la homo estas libera de la influo de ankoraŭ pli malproksimaj stelaroj kaj galaksioj. La fizikistoj rimarkigas, ke astrologio atribuas mistikan forton al la zodiakaj stelaroj, tamen tiuj stelaroj estas hazardaj ariĝoj de steloj, kiuj situas je malsamaj distancoj de la homoj. Post iu tempo pro stela moviĝo la stelara bildo ŝanĝiĝas kaj ili po iomete disiĝas.

Krome la fizikistoj demandas, se la astrologoj tiel klare antaŭvidas la futuron kaj sociajn eventojn, kial ili ne uzas tiun ĉi trezoran kapablon por averti pri minacantaj militoj, krizoj, financaj tumultoj, kataklismoj.

La psikologo konsentas kun la opinio de la fizikistoj kaj ŝerceme aldonas: „Kiam mi vidas astrologon, kiu gajnis milionon en kazino, tiam mi ekkredos lin.”

LAST

1. Por ne paroli pri la deka ankoraŭ sennoma planedo 2003 UB313.

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subvenu la Abonhelpan Fonduson!



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

REAGO

Kion signifas la nocio laŭnature?

La artikolo *Mia religio* de Gbeglo Koffi (MONATO 2006/12, p. 26) altiras atenton kaj meritas komenton cele al ne nuraj kompletigoj. Li skribas: „Religio de homoj ne havu nomon aŭ oni simple ne konsideru la nomojn de la religioj, ĉar tio naskas disputojn.” Sed eĉ tia lia opinio pri la nomoj de religioj naskas ja ankaŭ disputojn, do ne estus proponinda. Tamen, se la (bagatela) afero rilatus nur la nomojn, ĉu vere ĝi dividus nin, homojn? Ĉu temas vere nur pri nomoj, aŭ ĉu sub la nomo troveblas io alia?

Ŝajnas, ke por Gbeglo Koffi la sana religio reduktiĝas al vivi „en harmonio kun la naturo”, kaj ke por tion atingi li „ne bezonas scii, ĉu Dio ekzistas”.

Oni tuj vidas, ke tiuokaze la vorto „naturo” estas koncepto nedifinita: se oni provas ĝin difini, oni riskas frakasigi kontraŭ kruta rifaro. Fakte: ĉu vivas harmonie kun la naturo la homo, kiu luktas kontraŭ maligna tumor superabundanta en lia korpo? Ĉu vivas harmonie kun la naturo tiu, kiu agonias sub tertremaj ruinaĵoj? Aŭ kiu opinias siajn religiajn konvinkojn pli valoraj ol sia vivo?

Kaj krome, la koncepto pri naturo ne nur malfacile difineblas, sed ĝi ankaŭ estas elmetita al fatalaj (disputigaj, do) variacioj(!). Ekzemple, ĉu al la naturo harmonius same la homo, kiu kredas vidi en ĝi ion memoriginantan (do, la naturo estus io aŭtonoma), kaj la homo, kiu kredas, ke ĝi estis kreita kaj evoluas laŭ la plano de iu kreinto? Tia dua okazo postule proponas harmoniiĝon ankaŭ kun io alia!

Plue: la morto certe estas laŭnatura, sed ĉiu deziras ĝin eviti kaj volus ne eliri „el la naturo”. Ĉu do estus malbona la provo ne obei la dikta-ton de la naturo? Paralele kun tio, jen la murdo de senkulpujo, jen egoismo, kiu akumulas kaj malsatigas, jen la krio de justulo premita de maljustulo ktp. Kiu aŭ kio kapablas liberigi el tiuj? Ĉu la harmoniiĝo kun la naturo, kiu sensufere rigardas la birdon manĝanta la insekton kaj la serpenton manĝanta la birdon? Oni bonvolu legi la poemon *Ginestra* (Spartio) de Giacomo Leopardi.

Sed plue: kaj kio pri la homo farinta malbonon, la plej malbonan malbonon, kaj kiu nun celas rehomeciĝi – ĉu por tiu ĉi sufiĉus harmoniiĝi kun la naturo?

Estas la malbono, ĉiuspeca natura malbono, specife tiu moralnivela malbono, kiu postulas precipe alispecan harmoniiĝon. „La surhaŭta konstato pri sufero orientas onin al alia mondo kaj kaŭzas malkontenton pri tiu ĉi mondo”, „Estas la *natura* malbono, kiu postulas aliulon kaj faras lin serĉata”, „Mem la morala malbono ne penseblas sen Dio, kiu estas la fina adresito de la *kontraŭnatura* malobservo kaj de la principo de la rehomeciĝo kaj de la deziro nature sekvanta” (citaĵoj el la filozofo Luigi Pareyson, kiun ĉi-momente mi legas).

Jes, eĉ „de la deziro”. Oni scias, ke la deziro povas iluzii (la majstroj de la suspekto eĉ tro pri tio atentigas), sed ofte ĝi celtrafas, same kiel kiam ni serĉis amon kaj ĝin trovis aŭ amikecon kaj nun pri ĝi ni ĝuas.

Armando ZECCHIN

Sep citronsemoj

Ok personoj laboris en la oficejo. Sep virinoj kaj unu viro. La ĉefo.

La virinoj pace kunlaboris. Nur la ĉefo estis malpacema. La virinoj ne amis lin. Lia vort-uzo estis tre aĉa. Konstante li blasfemis. Krome li fumis. La virinoj ne fumis, sed sufokiĝadis. Ĉiutage ili kverelis kun li, ke li fumu ekstere, ne en la oficejo. Sed vane.

Maria estis la plej kompatinda, ĉar ŝi ankaŭ hejme havis similan viron. Ŝia edzo terure kondukis kun ŝi. Ofte ŝi alvenis matene al la oficejo plorante kaj nur niaj konsoloj helpis ŝin, ke tamen ŝi laboru, ne nur ploru.

Gizela estis ĉiam ridetanta kaj ŝi estis feliĉa edzino. Ŝi ne komprenis kaj ne povis kredi, ke ne ĉiuj viroj estas ankaŭ bonaj edzoj, kiel ŝia edzo.

Estis du Magdalenoj. La pli aĝa estis tre maldika, silentema; diligente ŝi laboris, sed ŝi ne atentis la problemojn de aliaj. La pli juna estis feliĉa fianĉino; iom naive ŝi aŭskultis la diskutojn de la koleginoj.

Katarina estis tre malriĉa, sed fiera. Ŝi ne volis akcepti helpon de la aliaj.

Por ŝi estis almozo, se iu donis al ŝi pomon aŭ iun ajn manĝaĵon. Kelkfoje ŝi senvorte malsatis.

Elizabeto havis grandan filon, kiun ŝi naskis kiel fraŭlino. Post kiam ŝi edziniĝis, ŝi naskis alian filon, sed la edzo ne volis akcepti la unuan infanon, do Elizabeto devis sekrete helpi sian unuenaskiton.

Poste aperis mi. La plej juna el ĉiuj. La virinoj estis tre amikemaj, helpemaj; tiel rapide mi alkitimiĝis al ili kaj al la laboro.

Sed mi tute ne povis akcepti la konduton de la ĉefo. Sekve mi petis lin, ke li ne fumu, ĉar ni ne povas elteni la fumon. Mi ne kverelis kun li; ĉiam tre bele, kun milda voĉo mi petis tiun favoron. Tiel mi atingis, ke preskaŭ neniam li ekfumis en la oficejo.

Poste mi komencis la batalon kontraŭ lia malbelega parolmaniero. Ege malfacile mi sukcesis. Fojfoje mi demandis lin, se lia patrino estus ĉi tie, ĉu ankaŭ tiam li parolus tiel aĉe? Li ofendiĝis, ke mi kuraĝas mencii lian patrinon, sed tamen iomete pli malofte li uzis malbelajn vortojn. Fakte mi suk-

cesis malsovaĝigi lin.

La 19an de novembro ni festis la nomtagon de Elizabeto. Ŝi alportis kukaĵojn, kaj eĉ la ĉefo partoprenis nian etan festeton en la duonhora paŭzo. Ni donacis al Elizabeto florojn, libron kaj inter niaj donacoj estis ankaŭ grandega citrono. Ni faris citronsukon, ĉar estis malpermesite trinki alkoholaĵon en la oficejo.

La citrono havis sep semojn. Ĝuste sep, kiom da virinoj laboris kune, en la sama ĉambro. „Ni semu ilin!” mi proponis.

Ni serĉis sep florpotojn kaj plenigis kun bona tero, poste ni semis la citronsemojn. Sur ĉiu poto estis skribita la nomo de la posedantino. Diligente ni akvumis ilin, ĝis aperis la etaj verdaj ĝermoj.

Kaj la plantoj komencis kreski. Sed ne simile! Post mallonga tempo tri citronplantoj ekvelkis. La restintaj kvar bele progresis en la kreskado ...

Intertempe la pli juna Magdalena edziniĝis kaj ne plu okupiĝis pri sia planto. Ĝi komplete velkis sen akvo kaj neniĝis, kiel la aliaj tri. Jam vivis nur la ►



MARTIN BELAM

► plantetoj de Elizabeto kaj Maria, krom la mia, kiu estis la plej alta el ili!

Mia citronplanto pli kaj pli kreskis. Mi petis la lignaĵiston de la fabriko, ke li faru keston por ĝi, ĉar la radiko de la planto bezonis jam pli grandan lokon.

Iutage Maria denove plorante alvenis al la oficejo. Ŝia edzo ebrie hejmenvenis post noktomezo kaj ili kvarelis ĝismatene. Eĉ minuton ili ne dormis. Ŝi ploregis kaj diris, ke ŝi ne plu povas

elteni la konduton de sia edzo.

Mi komencis konsoli ŝin. Ĝuste antaŭ Paskofesto ni estis. Mi pensadis pri amo kaj pardono. Mi ne scias, kiel alvenis al mi la ideo, sed mi konsilis al ŝi, ke ekde nun ŝi tute ne kverelu kun li! Ŝi estu milda, kiel sanktulino! Konstante ŝi ridetu! Ŝi parolu mallaŭte! Kuiru bonajn manĝaĵojn, la plej ŝatatajn de li! Se li venos hejmen ebria, ŝi eĉ ne rimarku tion! Ridete ŝi donu al li manĝaĵojn, karesu lian kapon! Minimume unu monaton ŝi konduitu tiel! Mi estas certa, ke li ŝanĝiĝos!

Kaj tiel okazis! Maria volis savi sian geedzecon kaj ŝi havis animan forton por fari ĉion eblan por ĝi. Alvenis Pasko kaj en ilia familio nova vivo komenciĝis. Venkis la amo kaj la pardono, kiuj regis ŝian animon. Naskiĝis miraklo. Nome, post unu jaro naskiĝis la dua infano kaj ili feliĉe kunvivis. Kaj ankaŭ ŝia citronplanto kreskis.

Elizabeto estis nekonsolebla. Mortis ŝia pli granda filo. La senpatra. Li malsaniĝis kaj malaperis. Ŝi vane serĉis lin. Li vojaĝis al iu vilaĝo, al la parencoj de Elizabeto. Nur antaŭ sia morto li volis sciigi sian patrinon. Malfeliĉa li vivis kaj mortis. Estis granda tragedio por Elizabeto la morto de la filo, ĉar ŝi sentis, ke ĝis la morto ŝi havos konscienciproĉon. Strange, de unu tago al la alia, ŝia citronplanto senviviĝis.

Pasis kelkaj jaroj. Mi ŝanĝis mian laborlokon, sed la citronarbeton mi kunportis. Fine, mi forlasis la fabrikon kaj mi hejmen portis ĝin en mian loĝejon.

La ĝardenisto de la fabriko provis grefti ĝin, sed sensukcese. Dufoje mi vokis aliajn ĝardenistojn en mian hejmon, sed ankaŭ ili ne sukcesis produktigi mian citronarbon. Sed ĝi jam tiel kreskis, ke mi devis fariĝi novan keston por ĝi. Jam ĝi estis unu metron alta, kaj ĝia trunko estis kiel mia artiklo, la folioj kiel homa manplato. Ĝi fakte plenkreskiĝis.

Mia citronarbo iĝis sepjara. Kaj kion ne sukcesis fari la ĝardenistoj, la naturo solvis. Aperis la unua floro! Ĝi estis belega kaj laodoro estis ĉiela! Mia feliĉo estis senlima! Post iom da tempo aperis la dua floro, kaj post mal-

longa tempo mi jam ne povis kalkuli ilin. Entute ĉirkaŭ 600 floroj aperis. La verda arbo iĝis blanka. Ĝi aspektis kiel grandega, belega, neĝblanka fianĉinbukedo!

Ĉirkaŭ 50-60 citronoj estis la rezulto de la kelkcent floroj. Finfine restis ses citronoj. La unua floro bezonis ĝuste unu jaron, por ke ni povu rikolti la unuan citronon. Ĝi estis grandega, en la apoteko mi iris por ekscii, ke ĝia pezo estas 300 gramoj! La sesa, nome la plej malgranda 250-grama estis. La aliaj falis, kiam ili atingis la grandecon de pizeto, aŭ avelo, aŭ nukso.

La gusto de la citronoj, kiuj maturiĝas sur arbo – ne kiel la verde rikoltitaj kaj vojaĝigitaj ŝipe – estas sensacia! Ili estas dolĉaj!

La unuan citronon mi dispecigis, kaj ĉiuj miaj familianoj ricevis el ĝi kaj ĝuis la guston de la dolĉa citrono de mia unua rikolto!

Pasis unu jaro, poste ankoraŭ unu, mi atendis senpacience, ke mia citronarbo denove ekfloru. Vane!

Mi kaj mia patro, ni skribis leteron al iu scienca gazeto, kun la demando, kion ni devus fari, ke la citronarbo denove ekfloru kaj iĝu fruktodona.

Alvenis la respondo! Verŝajne la citronarbo tro laciĝis pro tro multaj floroj; ĝi devas nun ripozi, sed se ĝi tiel „sovaĝe” komencis de si mem frukti, tio signifas, ke ĝi iĝis fruktodona arbo. Ni nur atendu pacience! Ni atendis.

Intertempe mia patro mortis.

Mia citronarbo iĝis pli granda, sed eĉ unu floro ne aperis.

Mi ŝanĝis mian loĝejon kaj ankaŭ la citronarbo ricevis pli grandan keston. Ja ĝi jam atingis du metrojn.

Mortis ankaŭ mia patrino.

Ni restis nur du: la citronarbo kaj mi.

La kvindekjara citronarbo malsaniĝis kaj ankaŭ ĝi mortis.

Ĝia kesto nun troviĝas sur mia balkono. Mi plantis rubusojn kaj mi atendas nun: ĉu iam mi manĝos rubusojn de sur mia planto?

Mian citronarbon mi ne povas forgesi. En mia animo ĝi vivas, kiel la aliaj gekaruloj, kiuj feliĉigis mian vivon kaj donis sencon al ĝi.

Sigmond JÚLIA

ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

Antverpeno festas pro 100-jara ekzisto de la klubo «La Verda Stelo» per **INTERNACIA RENKONTIĜO**

PROGRAMO : **Elektebleco el paralelaj programoj:**

- ✦ Prelegserio «Kulturo de la Kluba Vivo» kun diskuteblecoj
- ✦ Kunveno de Kunlaborantoj de Vikipedio
- ✦ Turisma programo:
«Esploru Antverpenon» pere de gvidataj vizitoj
- ✦ Vesperaj programoj :
Sabato 26/05/07 - JOMO
Dimanĉo 27/05/07 - Popolmuziko kaj dancado en Moderna Vesto.
- ✦ Festaj manĝoj
- ✦ Tranokteblecoj ĉe Esperantistoj kaj en 3 kategorioj de hoteloj

**Jam nun notu la
daton en via agendo
Pentekosto:
26, 27 kaj
28/05/2007**

**Petu la alsendon de faldfolio kun detaloj ĉe: Esperanto-Antwerpen@esperanto.be
aŭ rigardu : www.geocities.com/esperanto_antwerpen**